

# UDFRANGIA STELO

N° 146

3a kvaronjaro 98

Jarabono : 35 F

Federacio de

Langvedoko - Rusiljono

CCP 956-28 P Montpellier



\*\*\*\*\*

*La esperanto-evento de la lastaj semajnoj estis la Universala Kongreso de Montpellier, kiun partoprenis pli ol 3000 homoj el 68 landoj. La taksoj iras de « kontentige » ĝis « tre bone ». Tiun rezulton oni ŝuldas al tiuj, kiuj zorge preparis ĉion kaj al la dekoj da bonvolemluloj, kiuj helpis dum la kongresa semajno. Fojon plian oni povis konstati, ke Esperanto estas ĉies afero. Nur por la ekskurs-  
sa fakto kontribuis pli ol kvindek personoj. Ne estis tro da helpantoj, almenaŭ sufiĉe por funkciigi la « maŝinon ». Dankegon al ĉiuj !  
La esperantistoj, kiuj vizitis la kongreson, eĉ nur unu tagon, estis entuziasmaj pri la reganta internacia etoso kaj la riĉa programo. Dekstre vi trovos la unuan komenton de la redaktoro de « Eventoj ». Sur la sekvantaj paĝoj vi trovos diversajn gazetartikolojn pri « la » evento.  
SFS ne sufiĉus por aperigi ĉion !*

*Espereble la esperantistaro nun kapablos rikolti la fruktojn de la okazintaĵo. Nia regiona federacio, kiu paŭzis pro la preparlaboroj de la UK, kunvenos en Béziers sabaton la 17an de Oktobro kaj invitas vin por kune decidi, kiel progresigi nian idealon kaj nian lingvon. Ek al nova etapo !  
Esperanto estas ĉies afero, do la via !*

*J. Hélin*

## "LA" aranĝo...

Ekzistas gazeto, kiu nomas sin "LA internacia sendependa gazeto de la Esperanto-mondo" - kvankam ne estas tio. Universalaj Kongresoj de UEA ne nomas sin iel simile, tamen reale ili estas LA aranĝo de la Esperanto-mondo!

En la ĉi-jara kongreso en Montpellier kunvenis pli ol 3000 homoj el ĉiuj anguloj de la Tero (oficiala nombro de aliĝintoj: 3133). Eble okazis nenio mondskua, eble ne ankoraŭ alvenis la "fina venko", sed certe en la UK oni povis vere senti sin en Esperantujo. Ien ajn oni povis iri en la kongresejo (eĉ ofte en la urbo), ĉie oni renkontis E-parolantojn...

Eble okazis malgrandaj organizaj eraroj poste rapide solvataj, eble iujn ĝenis la amaso, eble estis tro varme (aŭ malvarme), - sed certe oni povis senti sin tre bone en tiu vigla, svarma, senhalta tumulto, kie oni povas trovi plejmulton de konataj movadaj aktivuloj.

Se vi ankoraŭ neniam partoprenis UK-n, nepre devas ĝin fari eble sekvajare, ja sen ĝi vi ne povas imagi: kio estas en la realo "Esperantio".

*László Szilvási*



La fédération du Languedoc-Roussillon pour l'espéranto  
vous invite à sa réunion d'automne  
le samedi 17 Octobre, Maison de la vie associative à Béziers, à partir de 10h  
(route de Narbonne, 500m après la gare)

Vi trovos en tiu numero de SFS diversajn raportojn pri la UK (Universala Kongreso), eble ankaŭ en la venonta. Tamen SFS estas simpla federacia bulteno kaj prioritare ĝi raportas pri la vivo de la federacio.

Kiel anoncite sur la frontpaĝo, ni kunvenos en **Béziers la 17an de Oktobro**. Ĉiuj aktivaj esperantistoj estos bonvenaj. Komitatanoj bonvolos informi nian sekretarion Charles Gérard (4, Rue Dr Georges Rives 66000 Perpignan Tel 04 68 55 51 77) pri sia partopreno. Ĉar la kunveno certe daŭros pli ol du horojn kaj ni devos daŭrigi posttagmeze, bonvolu informi anticipe Suzanne Authier (9, Rue Georges Picot 34500 Béziers, tel 04 67 31 13 18) se vi volas mendi la **komunan tagmanĝon** en restoracio. Ni ne nur parolos pri nia agado en la lastaj monatoj sed ankaŭ pri niaj planoj, kiel (laŭ kiu metodo) kaj kun kiu (en la federaciaj komitato kaj estraro). « Être spectateur, c'est bien ; être acteur, c'est mieux » ! Certe vi havas interesajn ideojn, ni konkretigu ilin kune ! Kaj se vi ne povos partopreni, vi povas komuniki per letero aŭ telefono viajn rimarkojn kaj sugestojn. Okaze de la UK estis eldonitaj **poŝtkartoj** kun E°-teksto. Vidu kiel aĉeti la restantajn je interesa tarifo. Por la jarfinaj festoj, vi certe povos uzi ilin. Ankaŭ estis registrita por la ekskurso al Carcassonne-Limoux **videobendo** en E° pri la Kataroj ; ĝi estas ankaŭ mendebla al SFS. Ĉiu kongresano ricevis **broŝureton** « Sugestoj por individua vizito de Montpellier kaj regiono ». Restas kelkaj ekzempleroj, riceveblaj kontraŭ modera prezo. La poŝtkartoj, vidbendoj kaj broŝuroj estos riceveblaj en Béziers la 17an de oktobro (sen la sendkostoj !), se vi bonvolos anticipe mendi ilin.

Eble estas la loko por menci, ke la federacio kontribuis al la UK, ne nur dank'al la helpo de federacianoj dum la kongreso sed ankaŭ finance, per la presado de la menciata broŝureto, la projekciado de Sro Jardi pri la regiono, la subvencioj al la infana kongreseto kaj la koncerto de « kaj tiel plu » dum la festo de mondcivitanoj. La federacio ankaŭ konkrete agas.

Ni pardonpetas, ke ĉi-foje ni ĉerpis kompletajn tekstojn el aliaj E°-periodaĵoj, speciale pri la UK. Do ne estu surprizata, se vi jam vidis iujn tekstojn ie !

Ĉar alproksimiĝas la fino de la jaro kaj la **renovigo de viaj abonoj**, ne forgesu sendi 35F al la poŝtĉekkonto 956-28 P Montpellier je la nomo de Fédération d'espéranto du Languedoc Roussillon. Adreso de la kasistino : Lucette Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel 04 67 71 05 79. Ne atendu realvokon !

Bonan legadon de SFS 146a.



### **ALVOKO**

*Ĉu efiko de la UK, kiu donis la ideon al iuj esperantistoj organizi ion en nia regiono ?*

*La kooperativo de Literatura Foiro dezirus okazigi sian 5an Mediteranean Konferencon pri Esperantologio en la suda parto de Francio. La loko povus esti : Montpellier, Sète, Agde, Béziers, ... de la 31a de oktobro ĝis la 2a de novembro 1999. La temo estos : « La Esperanto-fonetiko, problemoj kaj perspektivoj ».*

*Por la organizado de tiu aranĝo (inter 20 kaj 30 personoj), LF-koop bezonus lokan helpanton aŭ grupeton da helpantoj, kiu povus konsili pri la kunvena salono, la loĝado kaj la manĝado.*

*Sendu proponojn al Marie-France Conde Rey 54, terrasses d'Égyptos 3, allée des Chaumes de Crayé 16000 Angoulême Tel : 05 45 61 69 25.*



### **UK de Berlino**

*Pluraj federacianoj, entuziasmaj post la UK de Montpellier, intencas partopreni tiun de Berlino sen deĵorado ĉi-foje. Ĉu per aviadilo, trajno, buso, veturilo kun ruldromo ? La diversaj eblecoj estas nun esplorataj. Se vi interesiĝas pri komuna vojaĝo, kontaktu SFS. Atentu, ke la unua aliĝperiodo jam finiĝis, la dua periodo finiĝos la 31an de decembro.*



### **Oktobro en Ariège :**

Kiel anoncite en la lasta SFS pluraj eventoj disvolviĝos en Ariège en oktobro : inaŭguro en Montbel apud Montségur de « rue de l'espéranto » la 17an de oktobro, pana antaŭ-semajnfino en Ballagué de la 21a ĝis la 23a (la munĵetada semajnfino estos en Gaillac-Toulzou apud Tuluzo de la 23a ĝis la 25a de oktobro) kaj fine ĥorstaĝo en La Freychède de la 25a de oktobro ĝis la 1a de novembro (kun Zdravka Bojčeva el Bulgario).

### **Tuluzo :**

SFS ricevis longan raporton pri la aranĝoj de la lastaj monatoj. Ĉe la lingvo-forumo de Prima de las Lengas en Junio partoprenis Ilona Koutny, hungara universitatano, kiu instruas la hungaran, lingvistikon kaj esperanton en Polio. Ŝi devis rebati publike la senfundajn kaj antaŭjuĝajn argumentojn de sociolingvisto H. Meschonnic. E°-stando kun diskoj, gazetoj, libroj kaj voĉsintezilo en E° allogis multajn homojn.

En Julio naŭ bosniaj junuloj pasigis tri semajnojn en la tuluzo regiono kun samaĝaj francaj geknaboj. Espereble tiuj intersanĝoj povos pludaŭri. La francaj geknaboj volas perfektigi en E° kaj korespondi kun pluraj landoj.



## VIVO DE LA GRUPOJ

### BEZIERS

Kompreneble, en la lastaj monatoj, la ĉefa okupo estis la UK. Deko el nia grupo laboris aŭ en la LKK aŭ kiel helpantoj. Dankon al ĉiuj ! Post tiu laboro ili bezonis ripozi dum kelkaj semajnoj kaj ĝojis denove renkontiĝi okaze de **komuna manĝo** en la ĝardeno de Mado en Valras. **Bonegan paeljon** preparis Dalia kaj ŝia edzo. Gratulojn !

La 12an de septembro okazis la « **Aleoj de Asocioj** ». Bedaŭrinde malbona vetero ne favoris : malvarma ventego blovegis kaj ĉiuj informiloj, paneloj, libroj intencis forflugi. La deĵorantoj pasigis la tempon malebligante tiun forflugon. Pro tiu aĉa vetero venis ne multaj gapantoj. Tamen ni povis informi kelkajn kaj kontraŭbatali antaŭ-juĝojn.

**Kursoj** . En nia kunveno de la 19a de septembro ni decidis la horaron de la kursoj :

**unuagrada** : vendrede je 17h30 en Domo de Asocioj. Gvidos J-C. Roget ; unua kurso la 2an de oktobro

**duagrada** : vendrede je 16h en la socia sidejo (Rue G. Picot)

**triagrada** : vendrede je 14h15 en la socia sidejo. La 2agrada kaj la 3agrada kursoj estas gvidotaj de S. Authier, komenciĝo la 9an de oktobro. Bedaŭrinde Jean-Pierre tiumomente ne povas zorgi pri kursoj.

**Kunvenoj**. Nun ni devas pripensi la estontecon. Do jen la datoj de la venontaj kunvenoj :

La **10an de oktobro** kaj la **14an de novembro** je 14h30 en Domo de Asocioj. La **Zamenhofa tago** okazos la **5an de decembro** ankaŭ en « Maison de la vie associative » (ĝusta nomo de Domo de Asocioj) ekde la 11a horo. Ni ne povas atendi ĝis la 12a de decembro, tamen pli taŭga dato por tiu festo, ĉar en tiu antaŭkristnaska periodo tre multaj festoj okazos kaj la « domo » estos plenplena. Tamen la rezervita dato (5/12) ebligas al niaj grupanoj partopreni Z-tagon en aliaj urboj, ĉu ne ?

**Staĝo** . Ni antaŭrezervis **Batipaume por la semajno 2a ĝis 9a de Junio 1999**. En la venonta SFS vi trovos pli precizajn informojn.

### PERPIGNAN

Kiel antaŭvidite, la 27an de julio, en nia centro, je la 18a horo, nia grupo akceptis sian japanan korespondanton, S-ron EGAWA kaj lian edzinon, survoje al Montpellier. En la bonveniga kunveno ariĝis ĉiuj esperantistoj, el kiuj pluraj de eksterlanda deveno. Post babilado en internacia etoso, interŝanĝo de donacoj kaj tosto, okazis je la 20a horo komuna vespermanĝo en restoracio.

La 28an de julio matene du ĉiĉeronoj akompanis niajn du geamikojn al la urbeto Thuir por viziti la kelojn « Byrrh », kie inter aliaj troviĝas la plej granda kuvo en la mondo kun unu miliono da litroj.

Posttagmeze, ĉar S-ro EGAWA interesiĝas pri tiu fako, dank'al la klopodo de nia amiko D-ro BERTHONNEAU, eblis eniri la tukejon kaj la ege modernan kuirejon de la hospitalo de Perpignan. La koncernaj sekcistoj afable gvidis la viziton, malavaraj je klarigoj, tuj altradukotaj. Finiĝis la vizito per foto, kiu aperos kun artikolo en la venonta numero de la hospitala gazeto. Je la 21a horo en salono Arago, S-ro EGAWA prezentis, kun samtempa detraduko, diapozitivajn pri sia regiono, dancojn kaj kantojn antaŭ kvardeko da ĉeestantoj, ne ĉiuj esperantistoj. Ĉe la fino kelkaj el ili petis informojn pri Esperanto.

Ŝajnas, ke dum tiuj eventoj ni disemis en diversajn mediojn multajn grajnoj, el kiuj kelkaj eble ĝermos kaj kreskos.

### MONTPELLIER

La grupo kunvenis la 10an de septembro kun la jena tagordo :

- babilado pri dum- kaj post-kongresaj sintenoj,
- preparado kaj organizado de ĉi-jaraj kursoj diversnivelaĵ,
- preparado kaj organizado de la tuja foiro de asocioj,
- programo de venontaj monataj kunvenoj,
- diversaĵoj.

La venontaj kunvenoj estos la unuan ĵaŭdon de la monato, do la 1an de oktobro, la 5an de novembro kaj la 3an de decembro.

La kursoj okazos vendrede : 9h-10h30 (komencantoj) : Salle Pétrarque kadre de UTT  
10h30-12h (komencantoj)MPT l'Escoutaire, Rue des Razeteurs  
9h-10h30 (progresantoj)MPT l'Escoutaire.

La du lastaj komenciĝis la 2an de oktobro.

La grupo partoprenis en la foiro de asocioj la 13an de septembro. Granda, laciga laboro ; multaj vizitantoj, multaj demandoj pri E° kaj la kursoj. Ni laboru kuraĝe senlace !

## Réinsertion et Espéranto :

La asocio organizas intensajn staĝojn por komencantoj laŭ la Cseh-metodo. . La unua okazis la 19an k. 20an de Septembro (4 gelemantoj), la venonta okazos la 10an k. 11an de oktobro en Montpellier . Baldaŭ funkcios « renkontiĝo-spaco » ĉe asocio Passerelles, 26 rue Enclos Fermaud en Montpellier, ĉiun lundon de 18h30 ĝis 20h30 (kontrolenda horaro). Tio ebligos al la personoj interesigantaj pri E° sin trovi por legi gazetojn, revuojn, pruntepreni librojn, ktp. Por pliaj informoj, kontakti « R°+ E° » je la telefon-numero 04 67 75 62 98.

Kvar prelegoj estas anoncitaj por la venonta trimestro :

- lundon la **12an de oktobro** je 17h30 : prezeno de esperanto al la fervojistoj de Montpellier
- merkredon la **21an de oktobro** je 18h30 en la Domo de Heidelberg en M., Rue des Trésoriers de la Bourse, kadre de la asocio « Langues d'Europe » : gramatiko kaj propedeŭtika karaktero de E°.
- ĵaŭdon la **22an de oktobro** je 20h30 en Sète ĉe Alrec (association du Languedoc-Roussillon pour l'emploi et la culture) : la internacia lingvo, sed por kion fari ?
- ĵaudon la **19an de novembro** je 20h30 en Montpellier (Centre Lacordaire, 6 Rue des Augustins) : la internacia lingvo esperanto, vivanta lingvo kun idealo.

*Bonan sukceson al nia agema samideano T. Saladin. En la kolegio Joffre, kie pli frue okazis prelego pri la internacia lingvo, aperis artikolo pri E° en la lerneja gazeto. Ni semu kaj semu konstante !*

## 24a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo

La 24a ISM okazis de la 29a de Aŭgusto ĝis sabato la 5a de septembro 1998 en la familia feriejo Le Lazaret en Sète. La direktoro de Lazaret rajtigis nin, laŭ nia peto, traduki en esperanto la belan koloran prezentilon de la loko kaj presigi ĝin. Jorgos kaj Yvette Vierne tradukis la tekstojn kaj zorgis pri la presado. Lazaret pagos almenaŭ la duonon kaj la U-kongresanoj trovis en sia sako belan koloran informilon pri tiu bela familia feriejo kaj la anoncon de la jam tradicia Internacia Semajno ĉe Mediteraneo.

Sabaton la 29an de septembro alvenis 31 staĝanoj de 2 ĝis pli ol 80 jaroj. Kelkaj revenis por la 22a fojo, aliaj por la 10a aŭ 8a, sed la duono venis por la unua sed ne lasta fojo.

La unuan vesperon ni prezentis la instruistojn : Pierre BABIN kaj Marjo GUZZI, fidelaj gvidantoj de la kursoj kaj Atilio ORELLANA ROJAS, kiu la unuan fojon venis. Li gvidis la unuagradan kurson kun veraj komencantoj (unu telefonis al mi pro artikolo dum la kongreso por informiĝi, kiel lerni esperanton... kaj ŝi aliĝis la staĝon...) La vetero estis, kiel kutime, agrabla, la maro allogis multajn staĝantojn sed ne dum la kursoj. La semajnanoj estis seriozaj lernantoj. Ĉe la fino tri kuraĝuloj trapasis ekzamenojn .

Dum la tuta semajno la bunta libro-servo de Jorgos montris al la novuloj, ke la esperanta literaturo estas riĉa kaj varia. Plie oni aĉetis multajn tre variajn poŝtkartojn kun esperanto-teksto, Tĉemizojn, insignojn, sunprotektilojn por aŭto...

La vesperaj programoj, daŭra ripeto, estis variaj kaj riĉaj : Thierry SALADIN prezentis esperanton al aliaj feriantoj en Lazaret, Pierre BABIN raportis pri la malfacilega situacio de Grésillon. Ili bezonegas monon kaj ankaŭ tre gravas la bezonego de helpantoj eĉ respondeculo. Atilio parolis pri la Indianoj, unuaj loĝantoj de Ameriko. Tre interesa prelego kun belaj diapozitivaj. Nina, rusa instruistino pri muziko, ĉarmis nin per siaj kantoj kaj gitaroj. Ofte ŝi kantigis nin.

Jen la datoj de la **25a ISM : de sabato la 28a de Aŭgusto ĝis la 4a de septembro 1999.**

Y.V.

*Parto de la prospekto en esperanto pri « Le Lazaret ». Ne eblas fotokopii la tuton pro la uzitaj koloroj.*



### **feriejo al ĉiuj malfermita**

La tuta teamo de Lazaret  
por vi preparas agrablan restadon

komence de septembro

## **INTERNACIA SEMAJNO ĉe MEDITERANEO**

kun tri divers-nivelaj Esperanto-kursoj  
Jam instruis multaj E-famuloj, el 15 landoj,  
de I.L.E.I., ĈE, ICEM, ks, -movadoj  
Krom kursoj eblas marborda sunumo, turismo, kulturaj kaj  
distras vesperoj

**INFORMOJ - ALIĜO ĉe ESPERANTO**

5, rue du Docteur Roux  
FR - 34090 MONTPELLIER

### **familieca akceptado**

Ni tutan jaron akceptadas plene  
(loĝo kaj manĝoj)...

familles

familiojn

groupes

grupojn

individuels

unuopulojn

familiojn...

tutjare akceptatajn  
sed somere prioritatajn  
(semajnaj restadoj, de sabato al sabato)  
Akceptatas francaj "CAF" - kuponoj k. feri-ĉekoj

*inter maro kaj lagetoj  
niaj pasiaĵoj interdoniĝu*

**Nome de la Ĝenerala Direktoro de Unesko** mi ĝojas kore saluti la partoprenantojn de la 83-a Universala Kongreso de Esperanto.

Unesko aparte aprezas la ĉi-jaran kongresan temon, "Mediterraneo — ponto inter kulturoj", kiu kondukos al pli bona interkompreniĝo kaj solidareco inter la homoj per kompreno de fremdaj kulturoj kaj lingvoj. Mi krome notas kun granda kontento ke kadre de la kongreso oni okazigos specialan seminarion "Lingvo-politiko kaj interkultura edukado: kion alportas Esperanto?", temo kiu rekte rilatas al la aktivajoj de nia nove fondita Sektoro pri Lingvoj kaj ties LINGUAPAX-projekto, kiu — kiel vi scias — celas antaŭenigi lingvan diversecon kaj plurlingvan edukadon.

La kongreso aparte atentis la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Edukado al civitaneco, kaj lingvaj kaj kulturaj rajtoj, kiel parto de la homaj rajtoj, iĝas pli kaj pli esencaj en la lukto por paco. La festado de la 50

jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas unu el la prioritataj agadoj de Unesko kadre de ties programo por packulturo.

Estas klare ke la rezultoj de la kongreso pliriĝigos la laboron de Unesko en multaj kampoj, precipe la preparadon de raporto de Unesko pri la lingvoj de la mondo, kiu aperos en 2001. Ĝi estos aktualigita ĉiun kvinan jaron kaj donos al membroŝtatoj taŭgajn rekomendojn en la lingva kampo. La preparado de la raporto jam komenciĝis en proksima kunlaboro kun pluraj neregistaraj organizaĵoj, kaj ni esperas ke ankaŭ UEA partoprenos. Fakte, la sperto pruvus ke nia longdaŭra kunlaboro estas profitiga por ni ambaŭ, kaj ke multaj el niaj ĝeneralaj celoj kaj ideoj similas.

Dezirante al vi agrablan restadon en Montpellier, mi certigas vin pri la aprezo de Unesko al la grava laboro kiun vi disvolvas por krei mondon en kiu diverseco kunsonos kun pli granda unueco.

*Colin Power, Asista Ĝenerala Direktoro pri Edukado*

## MESAĜOJ AL LA KONGRESO DE MONTPELLIER

### Estas por mi granda plezuro

sendi bondeziron al la membroj de Universala Esperanto-Asocio en la momento kiam vi kunvenas en Montpellier por via 83-a kongreso.

Gesinjoroj, la nuna estas jubilea jaro. En tiu ĉi jaro de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ĉie en la mondo viroj kaj virinoj de ĉiuj haŭtkoloroj kaj de ĉiuj religioj kuniĝas por propriĝi al si niajn komunajn homajn rajtojn. Ili tion faras sciante ke la homaj rajtoj estas universalaj kaj nedisigblaj, kaj ke la lingvo de la homaj rajtoj estas komuna lingvo de ĉiuj popoloj. Ĝi estas verdire universala lingvo, kiu fremdas al neniu kulturo kaj propras al ĉiuj nacioj. Ĝi estas lingvo kiu asertas la rajton je evoluo, je vivo kaj libereco, je malsamaj opinioj kaj diverseco. Ĝi estas en la kerno de ĉio kion Unuiĝintaj Nacioj aspiras atingi en paco kaj evoluemo.

Kiam vi kunvenas en Montpellier por esplori la pontojn inter kulturoj, vi emfazos, mi scias, ke toleremo estas konstruelemento de ĉiuj pontoj, la bazo de ĉiuj homaj rajtoj, ĉiaj paco kaj progreso, ke lingvo oni devas uzi por superi diferencojn, kaj ke konstrua komunikado kreas pontojn, dum lingvo uzata kiel armilo nur apartigas.

Mi dankas al Universala Esperanto-Asocio pro ĝia laboro por antaŭenigi lingvon kiel ilon por unuiĝi anstataŭ disigi kaj pro via celebrado de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu ĉi konferenco povos valore kontribui al tiu procezo, per fortigo de ligoj kaj intersanĝoj de informoj kaj ideoj.

Mi deziras al vi agrablan kaj profitodonan semajnon en Montpellier.

*Kofi A. Annan,  
Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj*

### Ne nur la legendo de la babilona lingvokonfuzo

instruis al la homoj ke la plej grava komunikilo *Lingvo* povas disigi, sed ankaŭ kuniĝi. Estas homara revo venki lingvobarierojn kaj esti komprenata kaj akceptata de ĉiuj.

Pro tio oni serĉis en ĉiuj tempoj lingvojn kiuj estu lerneblaj kaj uzeblaj de ĉiuj. Bedaŭrinde tio restis ĝis hodiaŭ revo, kvankam ĝuste per la planlingvo Esperanto oni sukcesis evoluigi mondampleksan kaj vivantan lingvomodelon, kiu ja faris rimarkindajn progresojn.

Vi prenis por via kongreso la devizon "Mediterraneo — ponto inter kulturoj". Esperanto estas infano de la mediteraneaj lingvoj, ĝi prenis mult-

### Estas por mi granda plezuro

povi saluti vin okaze de la 83-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Tio havas plurajn kialojn. La unua estas ke la temo pri kiu vi elektis okupiĝi dum la tuta semajno — *Mediterraneo — ponto inter kulturoj* — estas por mi temo kara el pluraj vidpunktoj:

El persona vidpunkto, evidente, sed ankaŭ kiel respondeculo dum multaj jaroj de la egipta diplomataro. Diversfoje mi havis la okazon renkontiĝi kun mediteraneaj demandoj ankaŭ dum miaj kvin jaroj ĉe la kapo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

Ankoraŭ nun, kiam mi plenumas novan funkcion kiel Ĝenerala Sekretario de la Internacia Organizaĵo de Franclingvaj Landoj, la mediteranea areo estas denove en la kerno de miaj okupiĝoj. Tio montras kiom gravas por mi la diskutoj kiujn vi havos dum ĉi tiu grava aranĝo.

Cetere, mi nepre intencis omaĝi al la batalo kiun daŭrigas via Asocio jam de 90 jaroj: batalo sub la signo de amikeco kaj solidareco inter la popoloj, sub la signo de respekto al kultura diverseco.

En momento kiam tutmondiĝas la intersanĝoj, kiam konturiĝas minaco de lingva monotonigo kaj de kultura ŝrumpigo, ni ja devas mobilizi nin, por ke la monda komunumo, al kiu celas la leĝoj de la merkato, ne generu unu tutmondan kulturon kun unuecaj modeloj, kondutoj kaj pensado. De tio dependas la demokratigo, je monda nivelo, de la rilatoj interpopolaj!

Je la fino mi volas diri al vi ke en la vorto "Esperanto" mem troviĝas komuna espero: espero pri solidareco kaj toleremo, pri komprenemo kaj respekto al aliujoj. Troviĝas en ĝi ankaŭ certeco — pri la komuneco de nia destino kaj pri nia aparteno al unusola homa komunumo.

Tiujn valorojn mi dividas kun vi, kaj tial mi deziras al via kongreso la plej bonan sukceson.

*Boutros Boutros-Ghali,  
eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj,  
Ĝenerala Sekretario de la Internacia  
Organizaĵo de Franclingvaj Landoj*

nombrajn vortradikojn el la latina kaj estas ankaŭ sone parenca kun la mediteraneaj lingvoj. Kvankam arte konstruita sur desegnotabulo, Esperanto montras fortan vivovolon kiel parolata lingvo. Antaŭ ĉio la radiofonio fariĝis nemalhavebla ilo por la disvastigado de Esperanto.

Esperanto kontribuas al la alproksimiĝo de homoj kaj kulturoj. Pro tio mi opinias ke ankaŭ ĉi tiu lingvo gajnos signifon en la procezo de la elformiĝo

### Mi tutkore salutas vin ĉiujn,

kunvenintajn por kongresi en tiu bela, kulture radianta urbo Montpellier, ĉe Mediterraneo, per kies marbordo mi mem, antaŭ kvardek jaroj, unufoje eniris Francion, al kiu mi tuj enamiĝis kaj kiu sekve fariĝis mia elektita kultura patrolando.

Tial la kongresa temo, "Mediterraneo — ponto inter kulturoj", prezentas por mi persone tute specifan intereson, kvankam ĝia esprimmaniero iom konflikta kun mia inĝeniera arto. Kial la maro estu prezentata kiel ponto? Dum mia profesia aktiveco mi ja kontribuis al konstruado de pontoj trans maroj; se maro estus mem ponto, tiam mia laboro aperus do sencela!

En tiu senco Mediterraneo do ne estas ponto; tamen, ĝiaj marbordoj akuis kulturojn de la tri kontinentoj ĝin ĉirkaŭantaj. Tie naskiĝis kulturo de la antikva Egiptujo, kulturo helena, kulturo romia; tie evoluis tri grandaj religioj de la nuntempo: la hebrea, la kristana kaj la islama. Al ni, homoj de bona volo, al ni, esperantistoj, estu donita la tasko konstrui la ponton inter ili, la ponton inter la luliloj de kulturoj, de religioj, ĉiam memorante la noblan strofon de nia *Preĝo sub la verda standardo*: "... kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj / ni ĉiuj de Di' estas filoj ..."

Ni estu inĝenieroj de la ponto trans Mediterraneo, de la ponto de kompreno kaj de la sekva reciproka estimo de la diverseco de kulturoj florientaj sur ties marbordoj; de la diverseco ne plu estonta fonto de malamo inter ili, sed diverseco, de kulturoj kiu estu konsiderata kiel grandega riĉeco de la homaro.

Anstataŭ ŝipoj iam veturigintaj trans Mediterraneo legiojn de Romo por pereigi Kartagon kaj ĝian kulturon, anstataŭ ŝipoj de krucmilitantoj batalintaj kontraŭ alireligianoj, nia ponto servu vehiklojn de amikeco, por ke Mediterraneo ne plu dividu sed ligu la diverskulturajn grupojn en unu grandan rondon familian.

En la nomo de la familio Zamenhof mi deziras plenan sukceson al la 83-a Universala Kongreso de Esperanto.


*D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof*

de universala socio.

Estu la konsultiĝoj de via kongreso kontribuo por tio.

*Viktor Klima, Federacia Kanceliero de Aŭstrio*



# KONGRESAJ BILDKARTOJ



**6-karta serio:  
15 FRF**



*Tiuj poŝtkartoj estas haveblaj ĉe SFS (vidu la specialan mendilon)*



MONTPELLIER  
01-08  
augusto  
1998  
83a Universala Kongreso  
de Esperanto



**Sugestoj por individua vizito  
de Montpellier kaj regiono**

Ilustraĵoj kun la afabla permeso de / Illustrations avec l'aimable autorisation des  
Éditions Méridionales - B.P. 31 - 34430 St Jean de Védas  
L'editejo: nova kvartalo Antigone - Le Porton (tendooj, placoj, botinoj, ...)  
malsupre - marborda stacio, roksimo de Montpellier



*Tiu 7paĝa broŝureto, donacita al ĉiu kongresano, estas ankaŭ havebla ĉe SFS. Formato A4 (21 x 29,7 cm) kun pluraj koloraj ilustraĵoj. Ĝin akompanas plano, presita de la distrikto de Montpellier kaj havebla ĉe la turismoficejo de Montpellier. Vidu la specialan mendilon por la broŝureto, vidbendo kaj poŝtkartoj.*

Courrier des lecteurs  
de « Midi Libre »  
du 7 Septembre

## Esperanto

■ Durant le mois d'août, Montpellier a accueilli deux congrès internationaux. Tous les deux ont eu lieu au Corum, tous les deux ont duré une semaine, tous les deux ont rassemblé plus de 3 000 congressistes venus de tous les coins du monde. Mais ici s'arrêtent les similitudes.

Le Congrès mondial de science du sol a dû entraîner des dépenses additionnelles importantes pour la seule interprétation simultanée des discours et la traduction des documents (quatre langues officielles : français, anglais, allemand et espagnol).

Par contre, le Congrès mondial de l'espéranto n'a eu, par sa nature même, aucun problème de langue. Pour tous les discours, conférences, séances de commissions et groupes de travail, excursions ainsi que soirées de divertissement (théâtre et chanson) une seule langue sans frontières a été utilisée et comprise par chaque membre, qu'il soit d'Europe, d'Asie, d'Afrique ou des Amériques. Quand les gens qui nous gouvernent comprendront-ils que l'espéranto est le moyen de communication le plus efficace ?

Eskil SVANE  
(Pouzols)

## Un autre Mondial !

De Francis Bernard, de Mas-Saint-Chély, ce plaidoyer pour "l'espéranto" :

\*À Montpellier, du 1<sup>er</sup> au 8 août, se déroulera un autre mondial d'une toute autre importance que le football.

Il s'agit du Congrès mondial d'espéranto que la France a l'honneur d'accueillir cette année. Trois continents pour se parler en espéranto, la langue internationale par excellence. Il n'y aura donc pas de traducteur. On en profitera pour faire visiter notre beau pays de France grâce à des guides français espérantophones.

Mais aussi, ce sera l'occasion pour beaucoup de congressistes d'assister à des conférences, à des spectacles, à des échanges d'idées. On parlera de littérature espérantiste, de traductions de livres, en espéranto. Différents corps de métiers échangeront leurs expériences. On regret-

tera, une fois de plus, que très peu de gouvernements soutiennent l'espéranto en favorisant des cours, en formant des enseignants, en émettant par radio et télévision en espéranto.

Certains diront : « *Encore des utopistes !* ». N'est-ce pas plutôt utopique de penser qu'on puisse réussir une mondialisation sans l'aide d'une langue neutre ? L'hégémonie de l'anglo-saxon finirait par faire disparaître beaucoup de langues à l'exemple de ce qui s'est passé en France où, par exemple, l'occitan a pratiquement disparu.

